

Revulo aŭ profeto?

James D. Sayers: *Kutsu tähtiin*. 1951. 217 paĝoj. Eld. Kuva ja Sana.

Eble por la unua fojo oni tradukis el Esperanto en la finnan verkon, pri kiu oni kredus ke ĝi vekos pli vasten interesiĝon kaj por kiu oni tial deziras vastan legantaron. En verko, kiu havas mesaĝon, oni kutime ne tiom atentis pri la lingva flanko. Mi ankaŭ ne intencas trakti la libron kiel beletran produkton, kia ĝi certe ne estis celita, eĉ se oni en ĝi multoke rimarkas sentemon kaj belecon. La meritoj de la libro troviĝas aliloke kaj tial oni devas esti dankaj al instruisto J.N. Mikkola pro lia traduko.

Unue oni kredas esti leganta porknaban aventurromanon pri vojaĝo al Marso kaj oni rimarkas, ke pri streĉeco ĝi ne kompareblas kun Burroughs nek pri la disvolvado de problemoj de kosma trafiko kun Verne kaj Otto Willi Gail. Poste oni trovas sin meze de stranga amhistorio, kiu ja ne povas konkuri kun Galsworthy. Baldaŭ la leganto tamen trovas, ke la aŭtoro eĉ ne celas priskribi problemojn de kosma flugado, por kio li eble ne havas necesajn teknikajn sciojn, nek ankaŭ amon, eĉ se tiurilate li ŝajnas lirike pli dotita.

Sed li havas mesaĝon. La libro montriĝas mirinde fascina priskribo pri la pasinteco kaj estonteco de la homaro. Ni trovas nin precize en la centro de la prema atendado de nia nuntempa mondo pri tio, kio venos. La finaj vortoj de la aŭtoro malkovras lian kredon, ke la decidaj horoj de la mondhistorio estas ĉemane ĝuste nun kaj ke eĉ se la veraj profetoj falis en misfamon pro la multeco kaj vortabundo de falsaj profetoj, la leganto sentas sia devo iom pli bone klarigi al si tion, kion la Biblio rakontas pri la batalo de Har-Magedono.

La libro enhavas interesan teorion pri la pratempa evoluo de la vivo kaj pri la komenco de la homa historio, sed tute aparte pri la evoluo de la homaro al pli alta spiriteco, kiu laŭ la aŭtoro efektiviĝis en aliaj planedoj kaj sunsistemoj – ia versio de tio, kio povus okazi, se al la esplorado de la plejinterno de la homo oni dediĉus pli da energio ol al la antaŭenigo de teknika evoluo. La libro rakontas pri homoj de fremdaj planedoj, kiuj havas pli alte disvolvitaj la kapablojn, kiujn ni nomas parapsikologiaj, kaj krome multe pli bonan koron ol ni, sed tion ili atingis travivinte samajn suferojn, kiujn nia homaro verŝajne ankoraŭ alfrontos. Multloke la aŭtoro surprizas homon kun kristana mondkoncepto per originalaj konceptoj, pri kiuj oni antaŭe ne pensis.

Por legi la verkon ne necesas esti kristano, sed verŝajne post ĝia legado estas iusence pli facile esti kristano. Ĉiukaze la libro naskas ĉe la leganto la esperon, ke ankaŭ sur la Tero iam loĝos homo.

Se Sayers hazarde estus profeto aŭ disĉiplo de profetoj, lia mesaĝo estus tre konsiderinda kaj aktuala. Ĉiu mem pripensu la aferon.

Voitto Viro

Helsingin Sanomat 25 nov 1951